

EAB ADVANCED EXAMINATION WRITTEN PART - EXAM BOOKLET (SPECIMEN PAPER)

The actual exam booklet is the property of Esperanto-Asocio de Britio. You should return that, along with your answer sheets, after the exam. Please do not write on, or make copies of, that booklet.

La veran demando-foliaron proprietas Esperanto-Asocio de Britio. Vi devos resendi ĝin, kune kun viaj respondaj folioj, post la ekzameno. Bonvolu ne surskribi, aŭ kopii, tiun demando-foliaron.

Vi rajtas dediĉi tiom da horoj, kiom vi bezonos, por fari la ekzamenon, sed vi nepre resendu viajn respondojn antaŭ la limdato; tio estas du monatojn, post kiam oni sendis la demando-foliaron al vi.

*Kun evidenta escepto de la traduko el Esperanto en la anglan, ĉiuj respondoj al la demandoj estu **tute en Esperanto**; klarigoj pere de anglalingvaj ekvivalentoj estas malpermesataj.*

*Bonvolu skribi aŭ tajpi vian kandidat-numeron (**ne** vian nomon) sur **ĉiun** paĝon de viaj respondoj. Skribu aŭ tajpu sur nur unu flanko de ĉiu paĝo, kun malplena dekstra marĝeno de almenaŭ 5 cm. Se vi manskribas, klare nuligu iujn erarajn vortojn per unu streko.*

*Vi ja rajtas uzi vortarojn kaj aliajn konsult-librojn, sed vi **ne** rajtas ricevi helpon de alia homo, kaj ne rajtas uzi komputilan traduk-programon. Vi subskribu la deklarfolion, resendotan kun viaj respondofolioj, por atesti, ke viaj respondoj estas verkitaj sole de vi.*

ADVANCED EXAM: SPECIMEN PAPER



© Esperanto-Asocio de Britio,
Esperanto House, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent, Staffordshire, ST12 9DE

Tel: 0845 230 1887 or +44 (0)1782 372 141

esperanto.org.uk

Text extracts are © their respective authors or publishers

*EAB Advanced Examination Written - Exam
Booklet (Specimen Paper)*

La ekzameno konsistas el tri partoj; vi provu respondi al ĉiu parto. La maksimumaj poentoj sumiĝas jene:

<i>Parto Unu</i>	<i>Kompreno:</i>		<i>50</i>
<i>Parto Du</i>	<i>Tradukoj:</i>	<i>(a)</i>	<i>30</i>
		<i>(b)</i>	<i>20</i>
		<i>(c)</i>	<i>35</i>
		<i>(d)</i>	<i>25</i>
<i>Parto Tri</i>	<i>Verkado:</i>		<i>40</i>
<i>Sume</i>			<i>200</i>

*La sukcesniveleoj estas:
45% PASS, 60% MERIT, 80% DISTINCTION.*

*EAB Advanced Examination Written - Exam
Booklet (Specimen Paper)*

PARTO UNU: KOMPRENO

Legu la suban prozaĵon, kaj poste respondu en Esperanto la demandojn.

Mi ekrigardas malsupren, kovrante unu okulon por reteni la nokto-vidkapablon. Infero regas tie: grandaj incendioj, kiuj de tempo al tempo eruptas vulkane, kie bomboj ĵus eksplodis. Koloraj celo-montriloj flosadas malsupren; brul-kuglaroj saltas supren, kaj serĉlumaj strioj svingiĝas tien kaj reen silente-minace. En la flave bolanta aero ombraj maŝinoj manovras vesperte inter la ekstelaj obusoj. Jen alia trafo! El la kirliĝantaj flamegoj io falas – ŝajne parto de alo.

10 Bill vokas nin laŭvice. Ĉiuj respondas, kaj li sekve ordonas Paŭlon kontroli, ĉu io grave difektiĝis. Post kelkaj minutoj Paŭlo raportas, ke krom kelkaj truoj fuzelaĝaj ĉio ŝajne bonordas

15 La flama ĥaosso de la celurbo jam nur fonas, kaj la defenda artilerio senpovas kontraŭ ni, sed eventualaj surraŭtaj koncentriĝoj ankoraŭ minacas, kaj ĉasaviadiloj eĉ pli, ĉar la celo jam ne sekretas. Minacos ankaŭ dormo.

20 Miaj palpebroj jam pezas. Mi glutas pilolon, kaj provas konvinki min, ke ĝi efikas, sed devas tamen lukti kontraŭ kreskanta dormemo. Mi rigardegis en la mallumon, pikante la cerbon al aktivo per pensoj pri ĉasantoj. La motoroj zumadas, la abismo nigras. Estus timige paraŝuti en tiun abismon – paraŝuti de klifo. Paraŝuti inter du klifoj estus danĝere ĉar –

25 “–en ordo?” Mi eksaltas, konstatante, ke mi okulaperte gapadis nekonscie en la nokton.

“Jes, sed mi tre dormemas, Bill. Voku min pli ofte.”

“Volonte.”

*EAB Advanced Examination Written - Exam
Booklet (Specimen Paper)*

30 Mi glutas pilolon. Nur du ni oficiale ricevas, sed mi prenis de Stan, kiu tro okupiĝas por dormi. La celurbo estas ruĝa makuleto. Mi ekserĉas.

35 Mia koro eksaltas, kaj pulsegas en la gorĝo: ombro ekaperis baborde. Mi eksvingas la tureton – la ombro svingiĝas kun ĝi; estas makuleto sur la glaco¹. Mi provas deviŝi ĝin – sensukcese. Damno! Mi bone scias, ke ĝi plurfoje skuos min je ekvido subita, malgraŭ antaŭscio.

40 Mia koro daŭre pumpadas malagrabla pro la subita ektimo. Mi rotaciigas la tureton, kaj serĉadas; sed malgraŭ nervozo, malgraŭ la ĵusa skuo, insista dormemo revenas. Triborden, baborden; baborden, triborden! Kiam la tureto flankeniĝas mi povas senti kontraŭ la dorso la tremadon de la maldikaj pordetoj sub la batado de la ekstera aerofluo. Nur tiuj tremantaj ferladoj inter mi kaj nesondebla abismo! Mi treege dormemas; la tureto rotacias baborden; la pordetoj prezentiĝas al la aerofluo kaj tremas malantaŭ mi. Se ili forbloviĝus, Ĉu mi elfalus? Ili tiom tremas –

45 PEZA MANO FALIS SUR MIAN ŜULTRON!

50 Mi rigide gapas antaŭ mi atendante –? “Ankoraŭ ne,” mi preĝas. Mi ekmoviĝas, sed la peza Mano el la etero pli strikte tenas, kaj mi re-rigidiĝas; atendas. Mi deziras min turni, sed timas vidi –? Kial neniu venas por helpi? Ĉu la aliaj jam –?

55 La tureto, kiun mi eksvingis de la baborda ekstremo aŭtomite daŭrigas la rotacion triborden, trafas la tribordan ekstremon, kaj tremetas pro la subita halto. La Mano moviĝas, kaj mi ekvidas ŝtalan ungegon. Mi ekturnas min kaj vidas – ke la fajr-hakilo forvibris de la ŝtipo subteninta la klingon, kaj tenate sole de la leda rimeneto ĉe la tenilekstrema, faletis amike antaŭen sur mian ŝultron. Mi refiksas ĝin al la pordeto stulte penante ordigi la pensojn.

60 Estas ridige – histerie ridige, kaj mi miras, ke mi ne ridegas, kiel mi faris en multe malpli komikaj cirkonstancoj. Anstataŭ

EAB Advanced Examination Written - Exam Booklet (Specimen Paper)

65 ridi, jen mi sterniĝas super la kuglar-levanta maŝino senhelpe vomante. Mi cetere emas plori pli ol ridi, ĉar mi akre sentas la maljuston de la afero: trompi min tiel, ke mi kvazaŭ mortis – senutile.

¹ glaco: ĉi tie signifas *vitro-anstataŭaĵo uzata en aeroplanoj.*

Adaptita el *La tuŝo de morto (vitralo)* de John Francis

La ciferoj en [krampoj], sube, indikas la koncernan linion en la prozaĵo.

Unua Sekcio

1. Kio precize estas la okupo de la rakontanto?
2. Kiaj danĝeroj efektive minacas lin je tiu tempo?
3. Kiu estas Bill?
4. Kiajn pilolojn tiuj homoj ricevadis?
5. La aŭtoro trafe komunikas al ni sian nervozecon. Per kiuj specifaj ekzemploj li sentigas tion?
6. Kion la rakontanto supozis, kiam li sentis la *Mano*-n sur sia ŝultro?
7. Kial la aŭtoro ne trovis la epizodon komika?
8. Klarigu, kion la vorto *senutile* [66] komunikas al ni pri la animstato de la rakontanto.

Dua Sekcio

1. Klarigu la signifon de *kovrante unu okulon por reteni la nokto-vidkapablon* [1-2].
2. Klarigu la trafecon de jenaj vortoj en iliaj kunteksto: *vesperte* [7]; *ekstelaj* [7]; *ungegon* [56]; *amike* [59]; *histerie* [61].

*EAB Advanced Examination Written - Exam
Booklet (Specimen Paper)*

3. Kio estas la signifo de la frazo *eventualaj surraŭtaj koncentriĝoj* [15-16]?
4. Kial *la celo jam ne sekretas* [17]?
5. Kion sciigas al ni la frazo *La celurbo estas ruĝa makuleto* [30-31]?
6. Klarigu per viaj propraj vortoj la signifon de *Nur tiuj tremantaj ferladoj inter mi kaj nesondebla abismo!* [43-44].
7. Kion komunikas la aŭtoro per la frazo *el la etero* [49]?
8. Klarigu per viaj propraj vortoj tion, kio okazis por tiel morttimigi la aŭtoron.

Tria Sekcio

Verku resumon (proksimume 60-vortan) de la rakonto.

Kvara Sekcio

1. Klarigu la funkcion de la dupunkto (:) post *tie* [2].
2. Klarigu la neceson de la sufikso *-iĝ-* en *svingiĝas* [5].
3. Kial oni uzas la finaĵon *-n* ĉe *tien* kaj *reen* [5-6]?
4. Kial *pikante* [20] havas la finaĵon *-e*?
5. Kial *danĝere* [24] havas la finaĵon *-e*?
6. Analizu la vorton *okulaperte* [25].
7. Ĉu ekzistas signifodiferenco inter la uzado de *ek-* en *ekserĉas* [31] kaj *eksaltas* [32]?
8. Kial *Mano* [49] havas majusklon?

(Suma poentaro: 50)

*EAB Advanced Examination Written - Exam
Booklet (Specimen Paper)*

PARTO DU: TRADUKOJ

Unua Sekcio: Esperanto-anglen. Traduku en adekvatan anglan lingvaĵon la subajn eltiraĵojn:

(a) Rapide forfluis la lumaj horoj de mia pasema infanaĝo. Mi baldaŭ devis gajni mian ĉiutagan fojnon per tedegaj taskoj kaj suferi la drakonan leĝon de la mastro, kiu havis la ĉagrenan kutimon min instrukcii per nerompebla branĉo de palmo. Mi kreskadis en forto kaj belo, sed domaĝe ekokupis helotan oficon en la tempo, kiam mi komencis frandi la vivon. Jam pimpaj azeninetoj aplombe surprizis min per provoka ludo de siaj longaj okulharoj. Mi ne komprenis tiun aludriĉan mimikon. Sangondo impetis al mia koro, kiu febre batis en mia torako, sonora kiel tamtamo. Sed mi estis novico, mi ne sciis kion respondi al tiuj ĉarmulinoj kaj falis en ekstreman konfuzon ĉe pluvo da mokridoj. Mi promesis al mi glorajn kaj baldaŭajn venĝojn, dum mi malpacience mordadis mian buŝbridon kaj ŝvitegis sub la rikanema suno. Mi povas konfesi, ke mi malavare plenumis mian vorton.

Mi iĝis distrita, mi emis revadi ĉe la vesperiĝo, kiam la kamparo kvietiĝis, antaŭ ol engliti en la pacon de la dormo. Niaj turtoj pare kveris sur la altaj branĉoj de la figarbo. La norio psalmadis sian korpreaman elegion. La lastaj floroj de l' akacio lante agoniis, dum ŝvebis ebriga parfumo kaj fore sonis la sorĉa alvoko de amdezira solulino. Iam, kiam kliniĝis la taglumo kaj minacis fulmotondro, ne povante pli elteni, mi ŝtelrampis al favora najbarino. Mi estis akceptata kun plaĉa pardonemo kaj inicata al tiu dia plezuro, kiu svingas duonon de la mondo al la alia duono. Mi eksterhejme tranoktis, ĉasante palmarajn driadojn laŭŝance por trafo, spite de koketaj stamfoj kaj neatenditaj bastonadoj, kiuj, anstataŭ moderigi miajn aŭdacojn, ŝajnis ilin stimuli. Mi estis malgrasa, sed arda por la kurado; mi estis la Kasanovo de la oazo. Mia patrino estis informata pri miaj indignindaj malĉastoj kaj tanis al mi la felon.

EAB Advanced Examination Written - Exam Booklet (Specimen Paper)

*El Vivo kaj opinioj de Majstro M'Saud de Jean Ribillard
(30 poentoj)*

(b) Sed tiuj faktoj neniel influis la lingvistikan strukturon aŭ la literaturan elvolviĝon de la latina aŭ de la franca; ili ne klarigas, kial la unua estas fleksia sinteza lingvo, la dua fleksia analiza lingvo. Je la sama civilizstadio, oni trovas inter amerikaj Indianoj lingvojn jen fleksiajn, jen polisintezajn, jen analizajn, ktp. Oni rajtas do konkludi, ke, se lingvo estas grandparte socia fenomeno, ĝi estas nek klarigita nek profunde influata de la sociostato de siaj parolantoj.

Tute male, mi emas opinii, ke la lingvoj mem probable influas la mensojn de la homoj, kiuj ilin parolas, kaj ne inverse. La pli-malpli granda facileco, per kiu ili kapablas esprimi la abstrakton aŭ la konkreton, ligi la sensaĵojn en unu kompleksan blokon aŭ male artikigi la frazojn en interkroĉitaj propozicioj – tio, kvankam ĝi evidente ne kreas en la spiritoj propran emon al filozofio aŭ poezieco, tamen ebligas al tiuj du emoj malvolviĝi aŭ ne, kaj certe influas la direkton de la literatura fluo. La florado de la religio ĉe la hebrea popolo, de la filozofio ĉe la helena, de la juro ĉe la romana ja ne estas ŝuldata al la diferencaj ecoj de tiuj tri lingvoj – sed tiuj ecoj ja kontribuis al tiu florado kaj akcentis la nacian karakteron. La kvazaŭ simbola konstruo de la hebrea, kie la vortoj konsistas el tri signifoplenaj konsonantoj, inter kiuj venas ludi la nuancokreaĵoj vokaloj; la senfina fleksebleco kaj kunmetiveco de la helena; la masiva koncizeco de la latina: tio prezentis la plej favorajn rimedojn por la esprimado de la pasiaj Di-adoroj, de la subtilaj dialektikaĵoj, de la eterne valoraj maksimumoj. Estas neeble imagi iun Aristotelon kursanta en la hebrea, kaj, inverse, kiel oni sentas, ĉe legado de la *Septuaginta*, ĉion, kion la psalmaj aŭ profetaĵoj perdas en tiu flua, klara kaj intelekta lingvo!

*El Lingvo kaj vivo de Prof. G. Waringhien
(20 poentoj)*

*EAB Advanced Examination Written - Exam
Booklet (Specimen Paper)*

***Dua Sekcio: angla-Esperanten. Traduku en adekvatan
Esperanton la subajn eltiraĵojn:***

(c) Here the goldsmiths are tapping with their minuscule hammers: one looks up, grey-faced, secretive, eyes caught by the pomegranate necklace at my throat. I pause, two booths on, pick up an exquisite brooch of rock-crystal: inside the crystal, a marvel of art, is a tiny gold figurine, no longer than my finger-joint, Thetis bearing the arms of Achilles to Troy. But I am an exile: I put down the brooch and move on, Praxinoa a black shadow behind me.

Round the brick-kilns air is dancing, there are roof-tiles packed flat in the yards between layers of straw, my fingers drag over the matt surface of an unfired terracotta bowl. Smell of wet clay, wheels spinning in sunlight, pots surging up, bellying, finger-shaped at a touch, their bright mud-glisten soon gone. Then the painters, bird-faced with absorption, jars of coloured pigments at their elbow, pecking and swooping and dabbing over rows of buff-plain vases – too many vases, unending labour, mere repetition – sketching in friezes (the usual themes: chariots, warriors, wild-beast hunts) red and purple, leaving no spaces (value for money), cramming each corner with rosettes, acanthus-leaves: skimping their work, too, tricks of the trade – smudging an outline, stretching a leopard's spring farther and farther: four, not six, will encircle the vase now, no one will argue, the market is rising, Corinth can make art, export it, destroy it.

All too large, too loud, too violent: in false perspective, and smudged, like the leopards; built on shingle, a mirage of gold, a whore of a city, pimping its culture for quick returns, buying esteem with a show of wisdom, buying poets, musicians, artists, cankered, corrupting, sick at the heart. The blood that was spilt can never be dry, the lopped corn-ears gush red in the furrow. Old men sit by the fountain under the shade of the plane-tree, playing draughts, their eyes wary and hooded. The public statues look down, too

*EAB Advanced Examination Written - Exam
Booklet (Specimen Paper)*

bored or cautious to make any public pronouncement; better to watch, wait, survive.

From *The Laughter of Aphrodite* by Peter Green
(35 poentoj)

(d) Sit tight to survive a car crash

However valuable seat belts and air bags may be in the short term, some car designers believe that the long term solution to the problem of car-passenger protection will involve a basic rethink in vehicle design and construction. According to a new British patent, Harlan Hewitt of Chicago is already thinking up new ideas. Hewitt's proposal is to go right back to first principles and regard the passenger compartment and the vehicle chassis not as a single body but as two separate entities. According to Hewitt, a much safer car design would have a passenger compartment with a saucer-shaped base that fitted a mating saucer hollowed out of the chassis.

Under normal driving conditions the chassis and passenger compartment would stay locked together. However in a head-on collision, for example, the one would separate from the other so that as the chassis stopped dead, the passenger compartment would slide forward and at the same time tilt backwards.

A system of levers rigged between the two saucers would simultaneously tilt the seats in the passenger compartment so that when the passengers felt impact, a fraction of a moment after the chassis, they would all be lying with their backs parallel to the ground. They would then be in the best possible position for a crash, cushioned against shock by the base of their seats. There would also be no chance at all of anyone being flung through the windscreen.

(25 poentoj)

*EAB Advanced Examination Written - Exam
Booklet (Specimen Paper)*

PARTO TRI: VERKADO

Verku 500-vortan eseon pri unu el la jenaj temoj.

1. “Esperanto estas la latino de l’demokratio”.
Ĉu vi konsentas?
2. Mia plej ŝatata libro en Esperanto.
3. Novelo, kiu okazas en Esperanto-societo, *aŭ* koncernas internacian geedzecon, en kiu la hejma lingvo estas Esperanto, *aŭ* en kiu gravan rolon ludas la Internacia Lingvo.
4. Novelo, kies temon sugestas al vi unu el jenaj citaĵoj:
 - (a) “Vesperoj gaje pasas en kazino,
La glasoj tintas, li la fumon blovas.
Promene li ĉapelon flankenŝovas
Kaj dande turnas sin post belulino.”
 - (b) “Forpasis kure la juneco,
temp’ tro revema sen prudent’.”
 - (c) “Sufiĉas mia pipo kun tabako,
vidveca dormo sur la pajlosako
sur pura mar’ sub blua firmamento!”
5. Homaranismo.
6. La principaro de Frostavallen.
7. “Kaj unu el la plej geniaj trovaĵoj de la Majstro estis, ke Esperanton, tuj post ĝia naskiĝo, li fianĉigis al la poezio.”
Klarigu la gravecon de la literaturo en la evoluo de la Internacia Lingvo.
8. Priskribu viajn impresojn de unu el la jenaj:
 - (a) kongreso de Esperanto,
 - (b) la Esperanto-gazetaro, *aŭ*
 - (c) la Akademio de Esperanto.

*EAB Advanced Examination Written - Exam
Booklet (Specimen Paper)*

(40 poentoj)

*Jen la fino de la skriba parto de ĉi tiu **specimena** ekzameno.
En la **vera** ekzameno, vi devos kontroli, ke:*

- vi skribis vian **kandidat-numeron** sur ĉiun paĝon de via respondo-foliaro;*
- vi **subskribis** la deklaran formularon por indiki, ke viaj respondoj estas via propra laboro;*
- vi resendos, al la ekzamena administranto ĉe la adreso sur la kovrila paĝo*
 - (1) la deklaran formularon,*
 - (2) ĉiujn el viaj respondo-folioj, kaj*
 - (3) ĉi tiun demando-foliaron.*

ADVANCED EXAM:
SPECIMEN PAPER